

STEFANO

176

El la enhavo:

Jaroslav Mařík
František Kožík
Novaj honoraj membroj
Homonimoj 11
Rehabilit
Itala-Esperanta Vortaro
IFEF-kongreso en Košice



ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Jaroslav Mařík

EN LA JARO 1996

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
aperas 6-foje jare. Abono 16 glđ.

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio,
800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por
duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla
reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30%
rabato.

Membrokategorioj: A 160 Kč, B 80 Kč, (C
nulgita), D 40 Kč, E 40 Kč, F 3200 Kč, G
100 Kč (Starto), N 20 Kč, eksterlandanoj 20
ECU, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 335 Kč komencantoj,
240 Kč progresintoj. Aliĝoj: Blanka Gruntová,
Vítězná 95, 784 01 Červenka-Litovel

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova
658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732

Sekcioj de ĈEA: infana, junulara, skolta,
pedagogia, katolika, kristana, blindula, medici-
na, scienc-teknika, fervojista, ŝakista, SAT-
amikara, de esperantaj-kolektantoj

Komisioj de ĈEA: gazetara-informa,
ekzamena

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
poŝtkesto 1069, 111 21 Praha 1, Ĉeĥio

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA: 3330-021/0100,
Komerční banka, Praha 2

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vlastimil Kočvara, Ant. Sovy 10,
747 05 Opava

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 02.9912201, fakso
02.9912126

Vicprezidanto: Věra Podhradská, Poříčí I, 603
00 Brno, tel. 05/4323 3047

Sekretario: Květa Hubnová, Esperanto, p.s.
1069, 111 21 Praha 1

Komitato: Blanka Gruntová, Vítězná 95,
784 01 Červenka-Litovel

Komitato: Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1,
696 62 Strážnice, distr. Hodonín, tel. 0631/332
278, fakso 0631/332 507

Komitato: Zdeněk Heiser, Na Nábřeží
45/25, 736 01 Havířov, tel. 069/6815253

Kontrolgrupo de ĈEA: Jana Holcová,
Sportovní 2723, 276 01 Mělník (membroj):

Josef Hron, Libuše Krejčí)

Kontisto: Jiří Patera, U Rysánky 1534, 147
00 Praha, tel: 02.460162

Ĉefdelegito de UEA: Stanislava Chrdlová,
Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel.
02.9912201, fakso 02.9912126

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724
0690

Variabilní symboly pro platby Českému esperantskému svazu

- 311 expedice, úhrada koupených knih a
materiálu
- 604.2 písemné kurzy
- 604.3 předplatné Starto
- 604.5 předplatné Internacia Fervojisto
- 668 dary svazu
- 668.1 dividendy
- 694 členské příspěvky ĈES
- 694.1 členské příspěvky UEA
- 789.1 sekce mládeže
- 789.10 sekce šachistů
- 789.11 sekce sběratelů
- 789.15 ediční fond, Ringo
- 789.16 subkonta klubů mimo výše uvedených
- 789.3 sekce železničářů
- 789.30 Klub Praha
- 789.31 Klub Přerov
- 789.32 Klub Poděbrady
- 789.33 Klub Ostrava-Vítkovice
- 789.7 sekce pedagogů
- 789.71 členské příspěvky ILEI (jsou zároveň
předplatným pro Internacia Pedagogia Revuo)

Variabilní symbol uvádějte na přední straně
poštovní poukázky, zároveň na zadní stranu do
„Zprávy pro příjemce“ napište účel platby.
Upozornění pro majitele účtů u jiných bank!
Pokud platíte z účtu u jiné banky, uvádějte
nejdříve svoje jméno a bydliště, např. NOVÁK
PŘÍBRAM nebo PROCHÁZKA OLOMOUC
apod. Zároveň uveďte i variabilní symbol.
Dojde-li platba s označením „ČESKÝ
ESPERANTSKÝ SVAZ“, pak vůbec nevíme
kdo a proč platí. Takové úhrady účtujeme jako
dary svazu.

JAROSLAV MAŘIK

22. 12. 1913 - 5. 5. 1997

Honora membro de UEA, honora membro ĈEA, iama parolisto de la Esperantlingva elsendo de Radio-Praha, aŭtoro de *Resuma historio de la Esperanto-Movado* (1955), *Skizo pri la Esperanto-historio de Ĉeĥoslovakio, Kiu kiam?*, tradukinto de *Armea terminaro* (1948), *Konstitucio de Ĉeĥoslovaka Respubliko* (1948), *Lerneja reformo de Ĉeĥoslovakio* (1949), *Ĉeĥoslovakio en nombroj* (1959), ĉefa persono ĉe refondo de ĈEA en 1969.

Jaroslav Mařík ne plu estas inter ni, tiu ĉi informo dolorige trafis min, ĉar depost 1952, kiam ni la unuan fojon renkontiĝis en la Somera Esperanto Tendaro en Žimrovice kiel instruistoj, ni restis en amikaj rilatoj. Ni interŝanĝis amason da leteroj, mi vizitadis lin dum miaj deĵorvojaĝoj al Prago kaj li kelkfoje vizitis E-aranĝojn en Ústí n. L. Ĉiu renkontiĝo, ĉiu diskuto kun li riĉigis min. Mi timas, ke ni perdis unu el la lastaj vere grandaj esperantistoj en nia lando.

Jaroslav Mařík estis lingva fakulo, renoma tradukinto, eksterordinare bona konanto de E-historio kaj literaturo, modela prononcanto de la lingvo, sperta defendanto de nia afero kaj lerta aŭtoro de priesperantaj eseoj. Esperanto dominis lian vivon, precipe post kiam li pensiĝis. Li atente sekvis la en- kaj eksterlandan E-movadon, li sperte refutis atakojn kontraŭ ĝi, kolektis argumentojn por Esperanto kaj neniam dubis pri la grava rolo de Esperanto en la tuthomara estonto.

Li mankos al ni, li mankos al la afero de Esperanto ne nur en nia lando. Dum jardekoj li fariĝis kvazaŭ nedisigebla parto de nia movado. Kaj tamen li devis foriri ...

Kara JoMo (tiel li ofte subskribis siajn leterojn al mi), mi danke rememoros vian neforgeseblan amikan rilaton al mi, mi dankas al vi pro via sindona rilato kaj laboro por nia lingvo, mi dankas al vi pro via modela kontribuo por sukcesigo de Esperanto en la nuna mondo. Memoron pri via nobla personeco ni konservos en niaj koroj por ĉiam.

Prof. D-ro V. Novobilský
rektoro de J. E. Purkyně Universitato
en Ústí nad Labem

Malmultaj dediĉas sin tiel plene al la afero de la Internacia Lingvo kiel Jaroslav Mařík. Malmultaj estas same riĉe dotitaj per talentoj kaj kapabloj, energio kaj persisto, kiel li. Malmultaj mobilizas siajn spiritajn kaj fizikajn fortojn al nia afero kun tia entuziasmo kiel li. Lia memoro inspiru kaj kuraĝigu nin daŭrigi agadon por la idealoj, kiuj estis tiel karaj al li.

Osmo Bulier
ĝenerala direktoro de UEA

Al mi ĵus telefonis s-ro Ōba, ke laŭ faksa sciigo de vi, mortis s-ano Jaroslav Mařík. Tio ege surprizis min, ĉar nur antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis de li leteron. Ĉar li estis malnova aktivulo de la ĉeĥa esp-movado kaj honora membro de ĈEA, ne nur de UEA, mi sendas nun pere de vi mian plej profundan kondolencon al ĈEA. Li ja interpretis ĉeĥen mian peresp-an prelegon en Prago pri Japanio iam en 1960 dum mia restado tie kiel lektoro de la japana lingvo en Karel-Universitato.

Kurisu Kei

La subita forpaso de Jaroslav Mařík trafis dolorige nin ĉiujn. Kiam ni meze de marto renkontiĝis en la pensiono Espero en Skokovy, mi nepre ne pensis, ke mi vidas lin kaj diskutas kun li la lastan fojon. Akceptu nian kunsenton pro la perdo de tiu mirinde senlaca samideano kaj laborema homo.

Mgr. Zdeněk Hršel
(klubestro de Bmo)

Omaĝe al mia kara amiko Ma

Jes, li nomis min He kaj mi lin Ma. Mi ne plu vidos lin, sed ankoraŭ pasintsemajne mi respondadis je lia letero al mi ... sed li jam silentis. Des pli multe ŝokis min leginte anoncon pri lia morto! La vundo en mia koro estis granda! Sen ia ajn adiaŭo, sen letero, nur restis al mi rememoroj pri mia plej lasta renkontiĝo dum UK en Praha kaj ankoraŭ tiom mallonga.

Jana Cíchová

Kondolencojn sendis ankaŭ honoraj membroj d-ro Rudolf Horský kaj Alena Růžičková-Pavlinová, klubanoj de Karlovy Vary k.a.

František Kožík

(1909-1997)

Ke František Kožík, honora membro de ĈEA, estis unu el la plej elstaraj reprezentantoj de la ĉeĥa literaturo, estas konate. Li naskiĝis la 16-an de majo 1909 en Uherský Brod, kaj mortis en praga hospitalo la 5an de aprilo 1997. Pro sia verko-riĉo kaj kvalito li atingis la plej altan honorigon de verkisto nialande akireblan.

Kožík fariĝis doktoro de juro kaj studis ankaŭ dram-arton en konservatorio. En la komenco de sia literatura aktiveco li uzis kvar kaŝnomojn: A. Adam, Vojen Žalman, Karel Pokorný kaj J. Žalman ... ¹⁾

Ne eblas pritrakti ĉi tie lian tre abundan ĉeĥlingvan verkaron. ²⁾ Ni rememoru nur la verkon „La plej granda el pierotoj“ skribitan por Eŭropa konkurso pri nova romano (tradukata nuntempe en esperanton³⁾) kaj lian faman radiodramon „Cristobal Colón“, per kiu li iĝis unu el la prapatroj de radio-dramarto. En esperanto aperis lia verko „Lumo en tenebroj“ (Komenský), (ĈEA, 1992) kaj antologieto „Poeto ne mortas“ (ĈEA, 1984). Li verkis ankaŭ tekstojn de kantoj kaj operetoj. La opereto „Sur rozoj sternite“ devis esti ripetata de Radio Brno, laŭ deziro de eŭropaj aŭskultantoj. La teksto-

aŭtoro: „Žalman“.

En 1933 li membriĝis en TRAKT, grupo de profesiaj aŭtoroj kaj kantistoj („Teatro kaj radioaktoroj“) el la Ŝtata teatro en Brno, ĉe la tiea Radio. (Höger^{b)}, Bezdíček, Chalupa, Švábíková-Kožíková, Válka k.a.) por prezenti dramojn, operojn kaj operetojn en la internacia lingvo. Ili ĉiuj lernis esperanton en radiokurso, 1931, laŭ decido de la Radio-direktoro Ing. A. Slavík (s-ano). Tiel kreiĝis sinsekvo de radio-artaĵoj en esperanto, kiun la eŭropa aŭskultantaro nomis VERDA STACIO. - „Karolo Höger“, skribis Kožík, „akiris famon de la plej bona esperanta aktoro en la mondo.“ „Dum mia tuta vivo,“ diras Kožík aliloke, ³⁾ mi volonte partoprenis la agadon por plua disvastigo de Esperanto, instiganta la belan kunlaboron inter la nacioj.“ - Lia edzino, Zdeňka Kožíková-Švábíková, aktive rolis en la radiodramoj. - En 1949, nia homo devis labori kiel help-laboristo en aŭtomobil-fabriko Mladá Boleslav.

En Esperanto aperis lia verko pri J. A. Komenský „Lumo en tenebroj“ (ĈEA, 1992) kaj J. Karen kun J. Vondroušek ektradukis la faman romanon „La plej granda el pierotoj“.

Kožík mem verkis tiucele antaŭparolon. La poeto Karen provis instigi lin verki romanon pri la vivo de L. L. Zamenhof. Kožík reagis, ke li bezonus gravan dram-intrigon por povi tion verki, kaj tiu mankas al li. Mi do sendis al li en fotokopioj aron da materialoj, inkluzive de la biografio el la plumo de Julie Šupichová (kiun legante la patrino de Mikuláš Nevan larmis pro emocio) ⁴⁾ Kožík, ŝajnas, legis la materialojn, sed inspiro plu mankis. Li ankaŭ skribis al mi i.a., ke neniŭ eldonisto riskus eldoni tian verkon. Lia koncerna laboro estas verŝajne nur en antaŭprepara stato, kaj do plu ne finota.

La lasta adiaŭo al s-ano František Kožík okazis la 11an de aprilo en la krematorio Strašnice. Ĉeestis elstaraj personoj de nia publika vivo kaj granda aro da liaj admirantoj, La adiaŭajn alparolojn prezentis Miroslav Ivanov^{c)}, Gabriela Vránová^{d)} kaj la urbestro de Hluk. La lastajn tonojn aŭdigis kostumita ensemblo muzikista el Moravia Slovakio kaj gardostaris trupo de pragaj Sokoloj. La mortinto



mem estis Sokol-ano.

El la esperantistoj ĉeestis krom mi la poeto Jiří Karen. Mi sukcesis post vicego da kondolencantoj - ankaŭ esprimi al la filino kompaton de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio pro la forpaso de ĝia honora membro. Kun li forpasis la lasta TRAKT-ano de Veda Stacio Brno.

Jaroslav Mařík, 11.4.1997

- 1) Radio Praha, 29.11.89
- 2) Listo de verkaro de Kožík: en kompendio *Čeští spisovatelé 20. století (Ĉeĥaj verkisto de la 20-a jarcento)*
- 3) „En la koro de Eŭropo“, Prago, 1983, p. 14
- 4) Serio „Kdo je“, 89, Orbis Praha, 1947

Rimarkigoj de la redaktoro:

- a) La romano pri Gaspar Deburau jam estas tradukita kaj enkomputiligita sub titolo „La plej eminenta el pierotoj“, mankas nur eldonisto. J. Vondroušek tradukis ankaŭ romanon „Super valoj mateniĝas“ (en manskribo).
- b) Karel Höger estas unu el plej grandaj ĉeĥaj aktoroj rolanta en multaj filmoj kaj konata ankaŭ kiel majstra leganto de fabeloj
- c) Miroslav Ivanov - tre populara verkisto de „literaturo pri faktoj“ -

ĝenro, en kiu beletristo kun scienca precizeco kaj detektiva persistemo klopodas klarigi historiajn misterojn (ekz. pri morto aŭ deveno de famaj personoj, pri kreo de famaj falsafaj ktp.)

d) Gabriela Vránová, praga aktorino konata el televido kaj filmoj

Enkonduke

Al ekverko de la biografia romano pri Gasparo Deburau inspiris min mia amo al teatro. Mi studis la juron, sed samtempe mi ekstudis dram-konservatorion en Brno, kaj konforme al tio sporade mi helpludis, kiel juna aktoro, en pli-malpli signifaj roloj sursceneje de la Ŝtata Teatro en Brno. Foje oni "purigis" germanan arkivon - kelkfoje semajne ludis tie germanoj - kaj libro-amaso kuŝis en koridoro; dum miaj liberaj horoj mi trarigardadis ĝin kaj trovis teatraĵon fare de Melchior Vischer "DEBURAU". Sur la unua paĝo troveblis la rimarkigo, kiu kaptis mian intereson: "Deburau wurde in Kolín in Böhmen geboren" (Deburau naskiĝis en Kolín en Bohemio).

Ekde tiu tempo mi ofte pensis pri tiu ĉi ĉefdevena mimo. Iom poste mi prizorgis al mi lian unuan biografion fare de Jules Janin. Sed tiutempe mi nur poeziis kaj mankis al mi kuraĝo verki romanon. Post kiam mi ŝparis

sufiĉe da mono por vojaĝi al Parizo, mi venis al mia heroo en pli intiman kontakton. Mi ekkonis miniteatrojn en periferio.

En strato de la Gaité mi ekkonis kiel spektanto komedianton nomatan Monthéhus, kiu dumpaŭze de la prezentado de sia teatraĵo "La pariza frenezulo" prezentis kante al spektantoj lulkanton pri morta hispana infano; tiam estis la hispana civila milito. Mi ekkomprenis kiakvalita aktoro estis Deburau; li donacis al la publiko la necesan por la vivo. Tial la pariza malriĉularo tiom amis lin. Tial ekŝatis lin poste ĉiuj romantikuloj en Francio: Hugo, Baudelaire kaj aliaj.

Je fino de somero mi ekvojaĝis denove al Parizo por rekognoski la terenon, ekkoni la lokojn, kie Deburau vivis. Militmobilizo min revokis al la patrio. La tempo, kiun persone mi travivadis, fortigis mian ideon verki libron pri la komedianto, kies Muzo estis la popolo, ĉar li amis ĝin kaj deziris helpi al ĝi. Niaj viv-spertoj enpremis al mia subjekto novan mision - la romantika okazaĵo iĝis por mi simbolo de ĝenerala valideco. Mia Gasparo Deburau (Debiro) estas batalanto, kiu preparas vojojn al sia arto kaj konvinko, naskiĝintaj pro dolorozaj okazaĵoj de lia vivkariero. Mi deziris formuli la opinion, ke tiun arton falsas, kiu servas nur por brilo de la streta societo, ĉar mi kredas, ke la arto

havas sian mision, apartenantan al la tuta homaro.

Mia romano estis apreciata unuarange okaze de roman-konkurso. Eble tion kaŭzis la granda sentimentondo, kiu min dum la kreiva proceso portis kaj alproksimigadis la romanon al legantoj, emociitaj pro la spirita klimato de la nazia okupacio. Alvenadis leteroj, ekzemple: "Mi dankas al vi por la tuta pierotnacio". Tio estis tempo de la sekreta interkompreno inter aŭtoroj kaj legantoj. Sed, kiam en la jaro 1954 mi sukcesis akiri novajn historiajn fontojn, mi korektis la tekston. Mi ne povis toleri la senton, ke mi prezentas al miaj legantoj la verkon kun biografiaj eraroj. Mia romano "La plej eminenta inter Pierotoj" triumfe vojis al eksterlando. Ankoraŭ dumilite oni eldonis ĝin en Ameriko kaj en Anglio, poste en Svislando, en GFR, Italio, Nederlando, Jugoslavio, Pollando, ankaŭ en Sovet-Unio. La teatra muzikalo, verkita laŭ la romano, estis ludita sur kelkaj scenejoj.

Nun realiĝis do ankaŭ traduko Esperanten. La fakto min ekstreme ĝojigas, ĉar mi dediĉis al Esperanto, kiel ano de Radio-Stacio en Brno, multe da intereso kaj spertis, ke ĝi larĝe influas la publikon. Ni elsendadis en Esperanto la dramverkojn fare de Karel Čapek, operetojn, literaturajn horetojn pri spartakiado kaj ĝenerale pri nia patrio; la eĥo estis

impona, la poŝto liveris al ni post ĉiuj elsendado 2000 leterojn el la tuta mondo. Tial estis Radio-Stacio en Brno honore titolita VERDA STACIO.

Ofte mi rememoris miajn amikojn, kiujn varbis por nia patrio, precipe en eŭropaj nacioj, nia radioelsendado. Nun migros mia libro al iliaj infanoj kaj nepoj. Ege mi ĝojus, se la romano trovus ĉe la legantoj la same ardan akcepton. Kaj evidentas, ke volonte mi sciigos pri la eĥo, kiun ĝi vekis. Volonte ni akceptos ankaŭ viajn kritikajn rimarkigojn al la teksto kaj la traduknivelo. La libro iĝu instigo provokanta la plej intensan dialogon de la aŭtoro kun la legantoj. Ni



ambaŭ - la aŭtoro kaj la tradukintoj - dankemos al ĉiuj pri ilia intereso.

La mondo dividiĝis kaj fragmentiĝis pro diversaj influoj; Esperanto estas unu el la vojoj, kie ni povas renkontiĝi kaj komune iri al futuro man-enmane kaj konkorde.

Jen la mesaĝo, kiun mi kuraĝas almeti al transdono de mia romano en viajn manojn - kaj al viaj koroj.

František Kožík

NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE ĈEA

RNDr. Josef Kavka CSc.

Certe ne necesas vaste dokumenti meritojn de tiu ĉi nova Honora membro de ĈEA. Cetere la legantoj de Starto ofte renkontas lian nomon sub prilingvaj artikoloj ĉi tie publikigataj. Sed la teoriaj problemoj pri Esperanto estas nur parto - fakte nur hobia - de lia faka laboro. Profesia sciencisto-geologo, specialiĝinta pri petrologio, li publikigis multajn fakajn studojn, kompreneble ke krom en la nacia ankaŭ en Esperanto. Li verkis kelkajn



centojn da artikoloj, redaktis serion da faka periodaĵo Geologio Internacia kaj plurajn aliajn eldonaĵojn. Li estas aktiva kaj laborema membro de ISAE, ĝia longjara funkciulo kaj ankaŭ ĝia Honora membro. La honorigo flanke de ĈEA trafis lin en lia sepdekvinjariĝo, okaze de lia sepdeka naskiĝtago aperis en Starto (n-ro 3-1992) detala priskribo de liaj fakaj kaj organizaj meritoj. Ni rekomendas ĝin al la legantaro por plua informiĝo.

vlk

Mgr. Karel Kraft

Loĝanta en malgranda vilaĝo li en lastaj jaroj dediĉas sin al la esperantologia laboro. Unu el la plej gravaj tiudirektaj rezultoj estas freŝa eldono de esperanta-ĉeĥa vortaro, kiun li ĉefaŭtoras. Nun li kun kelkaj kunlaborantoj prilaboras la ĉeĥan-esperantan parton, kiu espereble aperos en proksimaj monatoj. En la movado li aktivis ekde 1949 kaj krom faka gravas ankaŭ lia organiza laboro, kiu rezultigis fondon de Esperantoklubo en Dobříš (1957) kaj en Příbram (1961), realigon de Somera Esperanto-Tendaro en Županovice (1958). En pluraj SET-oj li instruis Esperanton dum multaj jaroj. Profesie instruisto li agadis en Pedagogia sekcio de ĈEA kaj ankaŭ kiel membro de Ekzamena komisiono. Notinda estas lia dudekjara subteno al blindaj esperantistoj en Sovetio, kiujn li kontaktis pere de brajlo kun cetera esperanta blindulmovado. Lia movada vivo estas multifaceta, kvankam por siaj politikaj konceptoj lin ofte malhelpis la komunisma reĝimo en Ĉeĥoslovakio. Mgr. Karel Kraft, naskiĝinta 24.2.1926 en Příbram, dediĉas al Esperanto la plej grandan parton de sia vivo, kion ĈEA aprezas per honora membreco.

vlk

Li naskiĝis 19.1.1923, en 1942 li abiturientiĝis. Post la milito li en-skribiĝis en la universitaton, sed en la j. 1948 li estis el la studado eligita pro sia malkontento pri komunisma ŝtatpotenco. Pro ĝi li estis en kvindekaj jaroj areste punita, post elarestigo li laboris kiel laboristo.

En la movado li ekaktiviĝis en la jaro 1970 membriĝinte al ĈEA. Li fondis la Esperanto-klubon en la urbo Roudnice, kie li loĝas. Al liaj ĉefaj intereskampoj en la movado apartenas religia agado - aparte la ekumenia penado - kaj organiza kaj faka laboro en scienco kaj tekniko. Dudek jarojn



li plenumis funkcion de sekretario de scienc-teknika sekcio de ĈEA. En tiu periodo la sekcio atingis bonajn rezultojn kaj realigis altnivelajn fakajn seminariojn, kunsidojn kaj renkontiĝojn. J. Laube ankaŭ instigis aperon de kelkaj fakaj eldonaĵoj. Notindas ankaŭ liaj klopodoj utiligi Esperanton en internaciaj interurbaj kontaktoj kaj ankaŭ en diversaj ne esperantistaj movadoj en Ĉeĥio.

vlk

Anna Milatová (nask. 7.7.1910), la longjara kaj oferema esperantistino, forlasis nin en aprilo en sia 86-a aĝojaro. Ŝia nomo estas neforgeseble ligita kun la Esperanto-klubo en Třinec, sed ankaŭ kun la movada vivo en la tuta Ostrava-regiono. Ŝi ĝis sia lasta spiro aktiviĝis por esperanto organizinte ĉiujn aktivaĵojn en Třinec kaj tiuj estis oftaj. Sed ŝi eĉ en alta aĝo regule vizitadis renkontiĝojn en la regiono kaj ankaŭ en aliaj lokoj de nia lando. Ŝi partoprenis ankaŭ vicon da Universalaj Kongresoj, simbole la praga, je kiu ŝi ĉiam esperis, estis ŝia lasta. Ŝian rilaton al Esperanto dokumentas ankaŭ grandanimaj financaj donacoj, per kiuj ŝi - kvankam pensiulino - malavare subtenis nian asocion. Esperantistoj en la tuta Ĉeĥio tenos ŝin daŭre en rememoro.

VI. Kočvara

En Frýdek-Místek mortis la 19-an de februaro nia dumviva membro **Alfréd Bombionka** (nask. 24.5.1941) en sia 56 jaro. Li membriĝis en ĈEA en la j. 1980 kaj Esperanto estis lia grava hobia.

Politika situacio en Togolando

Antaŭ tridek jaroj ekregis la ŝtaton kiel prezidento generalo Gnassingbe Eyadema post renverso de la antaŭa reĝimo. De tiam ĝis 1991 ekzistis nur unu politika partio, kiu arigis vole nevole ĉiujn togolandanojn. Neniu kontraŭstaris la registaron pro timo esti persekutata, ĉar efektive torturoj



ĝis morto ne mankis. La rajtoj de la civitanoj nuliĝis. Ekde 1991 demokratia vento eniris la landon: pluraj partioj kreiĝis (ĝis nun 60), okazis „enlanda memstara konferenco“, kiun partoprenis delegitoj reprezentantaj tavolojn sociajn, politikajn ktp. Preskaŭ ĉiuj kritikis la ĝistiaman unu nuran partion kaj kompreneble ĝian fondinton. Dum tiu kunvenego elektigis „unua ministro“, malgraŭ ke la ŝtatestro kaj liaj partianoj malaprobis ĝiajn decidojn (t.e. de la Kuniĝo). En 1992 la tutlanda konstitucio estis adoptita per voĉdonado de la popolo. Multo estis laŭleĝe malpermesita por la bonstato de la ŝtato ĝenerale. Sekve de tio, sinmalamo staris inter la opoziciantaro kaj la eksa partio.

Iam estis de armeanoj batitaj la membroj de la Supera Respublika Konsilio. Sangelverŝaj eventoj malhumanaj naskiĝis. La pozicio de la unika partio kaj de ties kontraŭgrupoj iĝis akra, neŝanĝebla, kio kondukis al 9-monata striko. Tio vere blokis la evoluon demokratian. La konstitucio de la 4-a Respubliko ankaŭ starigis, ke armeano ne rajtas kandidatiĝi je la prezidenta posteno (aŭ devas ekŝigi antaŭ la kandidateco), sed Eyadema rifuzis, ĉar li fidis je siaj pafistoj. Laŭ alia leĝo la kandidatiĝ-mandato estas kvinjara, sed li jam aludis pri ŝanĝo, kion li povas fari eĉ perforte: igi la mandaton daŭra, senfina. Decas noti, ke pacemaj partiestroj kaj altranguloj faris multon por eviti militon. Alie Togolando trasuferus malfeliĉegon pli ol Ruanda, Liberio ...

En 1993 la malŝatata ŝtatestro reelektiĝis, neniuj scias kiamaniere. La opoziciantoj spitis, sed la rebalotado aŭ nuligo ne eblis. Poste formiĝis parlamento, kiu nun malesperigas ĉiujn. Kompare kun la pasinteco venis kelkaj ŝanĝoj, sed la praktikata demokratio ne estas vera. La lando suferas pro ekonomiaj problemoj, la salajroj de laboristoj estas pagataj malfacile.

Afrikanano

C. Minnaja: Vocabolario Italiano-Esperanto.

Milano, Cooperativa Editoriale Esperanto 1996, 1438 paĝoj.
Prezo 110 000 liroj.

Temas pri granda vortaro, la plej nova en la vico de vortaroj nacilingvaj-Esperantaj aperintaj lastatempe. Detalaj recenzoj jam aperis en Esperanto (1996, n-o 1086 = 11, p. 193) kaj Heroldo (1996, n-o 14, p. 1) tial mi... aldonu nur... koncizajn rimarkigojn. Jam la fortika bindo kaj bela eksteraĵo montras, ke la vortaro estas eksterordinara. Antaŭparole estas rakontata la longa historio de la vortaro, kiun diversgrade kunaŭtoris pluraj personoj. La bibliografio entenas 22 poziciojn pri la itala lingvo kaj 85 pri Esperanto. Sekvas konciza gramatika informo en la itala pri Esperanto (p. 24-29) de U. Broccatelli, kaj gramatiko de la itala lingvo de P. Gozzi-Gorini (p. 30-53). Instruo, kiel konsulti la vortaron, aperas en ambaŭ lingvoj. (Estus konsilinde aldoni liston de la uzitaj signoj, iliaj nomoj kaj funkcioj, en ambaŭ lingvoj, kiel estis farite pri mallongigoj.)

La vortaro akcentas la ĝeneralan lingvon, eĉ se fakaj terminoj ne mankas en ĝi. Gravaj estas t.n. ekzemplaj frazoj, kiuj montras - kelkfoje eĉ tro detale - la eblajn ekvivalentojn de la itala kapvorto. Unikaj estas la Citaĵoj (el ok verkoj,

i.a. ambaŭ tradukoj de Hamleto, Infero de Dante, Itala Antologio, Biblio). Jen pruvo, kiel grave estas elkonstrui vortaron sur ĉiuj bonaj literaturaj tradukoj. Post kelkhora foliumado en tiom ampleksa vortaro oni povas havi nur ĝeneralan impreson pri ĝi, kaj tiu estas plejparte pozitiva. Iom nekutime aspektas la (kursive presitaj) alilingvaj vortoj kaj esprimoj. La anglaj atestas pri la lingvovora efiko de tiu lingvo: multaj anglaj esprimoj eĉ ne havas italajn ekvivalentojn kaj estas uzataj en la originala formo (sed ne ĉiam kun la originala prononco). La latinaj tamen apartenas en alian vortaron (ekz. „par conditio“, „honoris causa“, „qui pro quo“, „cui prodest“ kaj multaj aliaj). Krome enestas pluraj alilingvaj esprimoj. Nur kelkfoje mi renkontiĝis kun nekutima esprimo, ekz. „vendi laŭ duona prezo“, „tranĉita de laceco“, „kun malfermitaj gamboj“. Mi trovis nur du preserarojn.

Resume: utila kaj en pluraj rilatoj modela verko, el kiu eĉ neitalo povas multon lerni.

Z.H.

REHABILIT...

En seminario de AEH en Přelouč, 09-11-96, aperis la bezono de termino por „zdravotní rehabilitace“, ĉar la unusola termino trovita de s-ro Vaněček, „rehabilitacio“ eksplicite estis jurasenca. Solvo tie ne trovita.

Kontrolinte poste plurajn vortarojn mi resumas: ekzistas ĝis nun la esprimo „rehabiliti“, *rehabilitovat* nur en la jura senco (rilatas la posedaĵon, honoron, oficon, sen rilato al la medicina „rehabilitovat“). Jen rezulto de mia kontrolo:

Kühnl-Procházka (1914): rehonorigi

Christaller (1923): rehonorigi, rerajtigi

Bennemann (1926): rehonoratigi

Plena vortaro (II. eld., 1924): ne havas

Filip (1947): REHABILITI

Wells (1969): reinstali, rehejmigi, rehonorigi

Plena Ilustrita Vortaro (1970): ne havas. Nek tiu ĉi, nek PIV-S enhavas „habiliti“ (docentiĝi)

Seemann (1970): rehonorigi; lék.: rehavigi (organkapablojn)

Vatré (1983): rehabiliti (redoni rajton, honoron)

Dr. Krause (1983): rehabilitado, rehabiliti sin (Evidente: jurasence)

Dr. Traxler (1983): rehonorigo (tribunala, administracia)

PIV-Suplemento (1987): rehabiliti (redoni rajtojn aŭ honorigojn)

Kraft-Malovec (1995): rehabiliti - redoni rajtojn aŭ honorigojn

RESUME: en ĉiuj vortaroj rehabilito

estas sole jurasenca.

Estas rekomendinde retralegi la rezonojn de B. Golden, Akamediano, en *STARTO 2*, 1992, p. 10-11 (La neologismo „rehabiliti“). Li sentas, ke la difino en PIV-S ne estas adekvata. Li konkludas, ke ekzistas *aparta* radiko „rehabiliti“, uzata en kontaktoj komunuzaj, jura, *medicina*. Mi (kun rezervo pri iuj liaj ecoj ne lingvistikaj) konsentas, ke taŭgas uzi estonte „rehabiliti“ ankaŭ en la senco medicina. Do: (zdravotní) rehabilitace - (sano)-rehabilito. Mi kredas, ke la plua leksika evoluo konfirme akceptos tiun nocion. Do mi trovas natura la titolon „Sanorehabilita Instituto en Kladruby“.¹⁾ - Med. d-ro J. Hradil konsentas.

Estas rimarkinde, ke kiel unua venis kun „rehabiliti“ ĉeĥa pastro Karel Filip (1947). La 1-a eldono de lia E-ĉ vortaro aperis en lia 18-a jaro (1929) sen „rehabiliti“.

Notindas ankaŭ aliaj terminoj trovitaj en literaturo: restatigo, sano-rehavigo, rekapabligo, retaŭgigi, rejjustigi, reĝustigi, reinstali.

Jaroslav Mařík

1) As. de E-Handikapuloj (en *Esperanto*, 11, 1996: „Rekapablīga medicincentro“)

KUNVETURU al BALTAJ ESPERANTO-TAGOJ!!!

Ni invitas tiujn, kiuj ne povas veturi en Aŭstralion al 82-a UK. Nia bus-karavano unue trarigardos **Malnovan Varsovion**, sekvos litoviaj urboj **Kaunas**, akva burgo **Trakai** kaj ĉefurbo **Vilnius** (Malnova Universitato, Malnova Urbocentro, Katedrala Urboplaco, multaj interesaj preĝejoj). Post konatiĝo kun malnova urboparto de la latvia ĉefurbo **Riga** interesigantoj ĉirkaŭŝipos la havenon. *En la estonia apudmara urbo Haapsalu ni salutos la kunvenon de geesperantistoj dum BET 33.* De tie vi povos busi al la ĉefurbo **Talin** kaj de Talin ŝipi dum unutaga ekskurso al **Helsinki**.

Dumvoje reen ni haltos en la apudmara litovia ripozloko **Palanga** (Monto de Sorĉistinoj, Monto de Krucoj, Muzeo de Sukceno, antikva pagana tombejo, Muzeo de Kaoso, sablaj dunoj kun specialaj flaŭro kaj faŭno, foiro de sukceso kaj de fiŝoj, Mara Muzeo, Delfenejo, naĝado en la maro.)

En ĉiu lando ni organizos kunveturon kun geesperantistoj, kiuj vin gvidos tra sia urbo. Ni startos el Praha matene 31.07. kaj revenos 13.08.1997. La prezo, kiu inkluzivas transporton per buso, tranoktojn kaj ĉiutagajn matenmanĝojn kaj vespermanĝojn en Litovio, Latvio kaj Estonio, laboron de esperantista ĉiĉerono kaj fundamentan asekuron, estas **12.250,- Kč**. La prezo ne inkluzivas enirbiletojn por muzeoj kaj por ŝipbileto el Talin al Helsinki kaj reen. Pluajn informojn vi ricevos ĉe nia adreso:



CK BALTICA
PhDr. Janina Křimská
Slovany 2751
276 01 Mělník
tel/fax 0206 626380

POR LEGEMULOJ

Mi volas vendi faksimilon de la UNUA LIBRO, Originalan verkaron de LLZ, Lingvaj respondojn kaj librojn fare de E-aj klasikuloj. Skribu al Adolf Staňura, Dlouhá 48, 736 01 Havířov-Podlesí.

PROVU TRADUKI

Ŝajnas, ke nia lasta tasko estis tro malfacila, ĉar venis nenia solvo. Do la redaktoro devas mem provi:

*La racio vidu pli penetre ol la okuloj.
Arbo ofte transplantata de loko al loko fruktas fuŝe. La suno sin kaŝas*

post la nuboj ne por eterne. Eĉ en musan truon enrigardas la suno. Pantoflo restas pantoflo, eĉ se oni ĝin brodas per oraj fadenoj. Arbo ne forrifuzas ombbron eĉ al tiu, kiu venis ĝin faligi per hakilo. Kie necesas ago, riproĉoj ne helpas.

Taskoj por venonte:

- 1) Opĉet selhal ĉovĉek
- 2) Pes by od nĉj kűrky nevzal
- 3) Ten slyŝi i trĉvu rűst

La redakcio atendas viajn solvojn.

Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature - 11

Josef Kavka

-IL-

Iom ni hezitis, ĉu daŭrigi ĉi-koncernan, jam sendube tro longan, ciklon de konsideroj (STARTO, 1994-1996, KAVA-PECH, 1996). Sed dume venis pluraj pozitivaj reagoj, eĉ fare de eminentuloj. Ŝajnas do, ke niaj analizoj, certe sen intenco ataki komunuzajn fundamentaĵojn, povas iel utili por tiu, kiu laboras super esperantigo de sciencaj nomoj.

Nian dekunuan konsideron ni dediĉu al ebla koincido de -IL- radikfina kun afiksa.

Inter la **fundamentaĵoj** interesos nin jena seso:

1. aprilo certe ne ĝenas kiel ilo por kapti aprojn;
2. facila apenaŭ havas ion komunan kun faco, la termino geometria;
3. humila, male, senpere koneksas kun humo etimologie, tamen ne kun ilo;
4. morbilo, jes estas speco de morbo, kvankam ne ĝia ilo;
5. pupilo (*pupilla*), la okul-aperturo, ja ne estas ilo por fabriki pupojn...;
6. vanilo (*Vanilla*) el orhidacoj, estas indiandevena nomo, sen koneksi kun la latina *vanus* = vana;

Oficialaĵoj ĉi-koncernaj estas tri:

1. bacilo (*Bacillus*). La laŭ PIV zamenhofa baco estis germana monero, do la oficialigantoj apenaŭ timis la homoniman bac-ilon;
2. berilo, la fama ciklosilikato, estas nomo helendevena, kontraste kun la germandevena bero;
3. pistilo, la flor-organo; pist-ilo, per kiu oni pistas. Jen homonima duopo sendanĝere kunekzistanta.

Da **neoficialaĵoj**, de kiuj ni estas interesataj ĉi-konekse, atendeblas multe pli:

1. acetilo, la radikalo CH_3CO -homonimas kun acet-ilo. Aceto estas acetata acido. Acetato estas zamenhofa, laŭ PIV;
2. akrilo, laŭ PIV apartena al akrilata acido, devus esti laŭ la nomenklaturado organik-hemia: akroilo. Jen kial en



Portmann-Rogers (1993) ĝi prave

mankas. Tamen ekzistas plejado da derivitaj terminoj, ekz. akril-aldehido, akril-amido, akrilato. Ne ĝenas la homonimeco kun la fundamenta radikalo akr- plus la sufikso -IL-;

3. amilo (= pentilo), ree radikalo organika, estas sendanĝere (ĉu?) homonima kun am-ilo. Pardonu, ĉar ni ne rezistas la tenton ŝerci...;

4. arilo, la radikalo aromata, homonimas krom ar-ilo kun la termino el la botanika morfologio (*arillus*). Prave, eĉ la triopa homonimeco ne ĝenu.

5. aspergilo (*Aspergillus*) estas mikroskopa hifomicet- (ŝim-) genro, kies sporangio fakte similas ilon por aspergi, do la homonimeco eĉ bonvenas,

6. bombicilo (*Bombycilla*), la genro de birdoj paserformaj, liverus homonimecon, se zoologoj esperantigus la silk-papilion ne per bombikso, sed pli prave per bombico (kp. nian konsideron Homonimoj 8);

7. bulbilo (*bulbillus*), konata ekz. ĉe ajlo, homonimas kun ilo de la fundamenta bulbo. Temas pri supertera kvazaŭbulbeto;

8. buterilo estas laŭ PIV radikalo de buterata acido. Tamen, la ĝusta nomo estas butirilo (aŭ butanoilo) kaj la koncerna acido: burir(at)a. Esperanto ne rajtas misformi la absolute internacian ĥemian terminon. Pro la sama motivo ekz. la germana lingvo ne rajtas lanĉi „Butteryl“ por la ĝusta *Butyryl*, kvankam butero estas angle *buter*, germane *Butter*. Aliflanke, la

botanika speci-epiteto *butyraceus* ape-naŭ esperantiĝu per stranga adjektivo „butiraca“. Ekz. por la fungo *Collybia butyracea* eblus rekomendi: **kolibio butereca**;

9. butilo, denove radikalo organik-ĥemia, estas homonima kun la ĝardenista but-ilo;

10. cedilo, la diakrita subsigno, ne estas ilo por cedi...;

11. ĉenilo: ĉen-ilo. Sen komento, ĉar ne temas pri naturscienca nomenklaturaĵo;

12. etilo, la radikalo C_2H_5 - estas homonima kun eta ilo (ileto);

13. fenilo, la radikalo C_6H_5 - povus sendanĝere homonimi kun fen-ilo, t.e. harsekigilo;

14. formilo, la radikalo de formiata acido, povus neverŝajne konfuziĝi ekz. kun ilo por formi ĉapelon;

15. fragila, latine *fragilis* el la verbo *frangere*, havas nenion komunan kun fragoj. La genronomo *Fragaria* devenas de la latina verbo *fragrare* = bonodori;

16. gerilo, la partizanmilito, homonime koincidas kun la mezurunuo gero kaj la verbo geri (= segi juntcele). Ger-ilo do estas koncerna aparato;

17. gracila, homonima kun grac-ila, devenas de la latinaj *gracilis* kaj *gratiosus*, tiuj ambaŭ de *gratia* = graco;

18. grenadilo estas, laŭ PIV, *Passiflora edulis*. Tamen, la brazila nomo *granadilla* koncernas alian spe-

cion de pasifloro: *P. quadrangularis*.
 Ĉar ne temas pri botanika nomenklaturaĵo, ni ne plu komentu la homonim-koincidon kun grenad-ilo;
 19. karbilo. Tiu ĉi PIVa nomo estas laŭ *Portmann-Rogers* (1993) evitenda. La ĝusta nomo: izocianido;
 20. koronilo (*Coronilla*), genro el fabacoj (laŭ PIV: legumenacoj), dum korono estas la plej ekstera, maldensa suntavolo;



21. manilo aŭ manila kanabo homonimas kun man-ilo;
 22. mantilo estas la hispaneska vestotuko, dum manto (*Mantis*) apartenas al ortopteroj, familio mantedoj (*Mantidae*);
 23. metilo, la radikalo CH₃-, homonima kun met-ilo;
 24. mutili (latine *mutilare*) = stumpigi; la latina *mutilus* estas prenita el la helena *mytilos* = stumpita; muta laŭ PIV estas nekapabla paroli aŭ silenta;
 25. naftilo estas radikalo de naftaleno,

dum naft-ilo povus esti instalaĵo por akiri mineralan oleon;

26. oksalilo estas radikalo de dikarbona acido, dum oksalido (*Oxalis*) mankanta en PIV apartenas al la familio de oksalidacoj (*Oxalidaceae*). Estas iom ĥaose, se PIV nomas la radikalon oksalilo, sed la acidon okzal(at)a...;

27. rutilo, la titandioksida mineralo, ricevis sian nomon laŭ la latina *rutilus* = ruĝeta, dum ruto (*Ruta graveolens*), la fama kuracplanto, estas nomo helendevena: *rytos* = likva, ĉar oni uzadis rut-ekstrakton en vino, akvo kaj vinagro;

28. senila: sen-ila. Sen komento;

29. serpilo (*Thymus serpyllum*), la bonodora floro el la lamiacoj (laŭ PIV eksmode: labiacoj) estas nomita laŭ la helena verbo *herpydzein* = rampi. Latine ĝi sonas *serpere*. Aliflanke serpo eble rilatas al *sarpere* = fortranĉi. Serp-ilo do estus pleonasma por serpo. El la nomo *serpyllum* deriviĝas la speci-epitetoj *serpyllaceus* = serpileca kaj *serpyllifolius* = serpilofolia, apartenantaj al aliaj plantoj iom similaj al serpiloj;

30. servila, t.e. servemaĉa, simptome homonimas kun serv-ila;

31. spirilo, el la latina *spira* = ŝraŭbkanelo, estas bakterio helice tordita. La homonima spir-ilo povus signifi spir-aparaton...

32. strobilo (la: *strobilus*, el: *strobilos* = turbo) havas en PIV referencon al

konuso 3, „infloresko kaj fruktaro de la pingloarboj“. Aliflanke strobo, mankanta en PIV, povus esti nomo de *Pinus strobus* = pino stroba. Ekzistas ankaŭ pluraj speci-epitetoj:

strobilaceus = strobileca,
strobiliformis = strobiliforma,
strobilifer = strobiloporta k.a.

33. tetrilo, la organik-hemia eksplodilo, ŝajnas homonimi kun la fundamenta tetro (*Lyrurus tetrax*), birdo el galliformaj (*Galliformes*), laŭ PIV galinoformaj, familio tetraonidoj (*Tetraonidae*), plus la sufikso -IL-.

34. uranio estas radikalo UO_2 ; ĉi-loke eblas noti, ke la radikala pseŭdosufikso, homonima kun la fundamenta, t.e. -IL-, premias la nomon de l' elemento: uranio, kiu estas registrita en PIV. Krome, se oni akceptas la salnomon: uranato (*Portmann-Rogers*, 1993), same ni venas al la radiko uran-, ne urani-. Jen problemo ne sole pri tiu ĉi element-nomo ... Multaj lingvoj, ekz. la germana, estas ĉi-rilate pli bonŝancaj: *Uran*, *Uranat*.

35. verticilo (*verticillus*), jen tri aŭ pli da folioj, branĉetoj aŭ floroj, kreskantaj el unusola nodo. Vertico, la zamenhofaĵo, havas laŭ PIV tri geometriajn signifojn. Etimologia kohereco de vertico kun verticilo estas evidenta.

36. vinilo estas triviala nomenklaturaĵo de la racia nomo etenilo: $CH_2=CH$ -kaj homonima kun vin-ilo.

En PIVS troviĝas:

37. armadilo (*Armadillidium*) estas genro de krustacaj izotopoj, parenca al onisko. Ĉi-okaze nenial povas ĝeni la homonimeco kun armad-ilo, sed la misformo de la kodigita latina originalo: devus esti armadilidio. Krome, PIVS referencas al „armadeo 2“ en PIV. Denove misformo, ĉar ĝuste la supra armadilo plej eble taŭgas por la hispana *armadillo*, t.s. „armitulo“ el dazipedoj.

En *Haferkorn* (1967) ni trovis:

38. kokilo (de: *Kokille*). Temas pri daŭra metala formujo, t.e. muldilo, en kiun oni gisas metalurgian ardaĵon. La termino estas transprenita ankaŭ fare de *Krause* (1983). Interese, ke PIV ne bezonis registri ĝin, kvankam temas pri tipa franceskaĵo *coquille*, hibrida el *coque* kaj la helena *konhilion* = konko.

Do, jen ni finis la paradon de 47 okazoj, plejparte neoficialaj, kiuj dokumentas, ke en Esperanto povas homonime koincidi -IL- radikfina kun sufiksa. Tio estas ĝojiga kaj konfirmas nian starpunkton, ke pro homonimeco ne estas dezirinde misformi nomenklaturan originalaĵon.

Tamen necesas mencii, ke timo pro la sufikso -IL- ekzistis, kvankam en okazoj tre raraj. Ni sukcesis trovi tri misformojn, neniom pretendante pri kompleta traserĉo de la vorttrezoro esperantslingva.

La fundamenta nomo aglo por la rabobirdo kaj la konstelacio ekvatora

(*Aquila*) estiĝis por eviti la homonimecon kun akv-ilo. Tamen nepre ne estus rekomendinde uzi la fundamentaĵon en okazoj strikte nomenklaturaj. Ekz. *Aegironema aquila*, la fosilia (ordovicia) braĥipodo pli eble devus resti **egironemo akvila**. Kun *Aquila* koheras propraj nomoj, ekz. Akvilono (PIV), *Aquilonia*, *Aquilius*, *Aquilianus*.

Plia **fundamenta** birdnomo estas fringo. Supozeble, kaŭ la internacie kodigita ornitologia nomenklaturado nepre pli ĝusta **fringilo** (*Fringilla*) el la familio de la **fringiledoj** (*Fringillidae*, france *fringilidés*) ŝajnis elvoki ĉe nia Majstro impreson de ia ilo, kvankam li mem neniam lanĉis verbon „fringi“ kun signifo alispeca.

El la **oficialaĵoj**, „mitulo“ dokumentas kuriozan misformon de la nomenklatura originalo *Mytilus*, la manĝebla marmolusko, kies normala nomformo devus esti **mitilo**. Por eviti koincidon kun la sufikso **-IL-**, oni riskis la same (sen)dangĉeran mit-ulon.

Antaŭ ol fini tiun ĉi konsideron, ni aldonu hazardan koincidon, kaŭzitan ortografie, kiu aperas okaze de la nomenklatura **-phyllum-** (= folio) kaj do estas en Eo homonima kun **filo**. Ni povas ekzempli tion helpe de fosiliaj plantoj, kies folioj similas tiujn de genroj nuntempaj:

<i>Laurophyllum:</i>	laŭrofilo
<i>Myrtophyllum:</i>	mirtofilo
<i>Platanophyllum:</i>	platanofilo
<i>Quercophyllum:</i>	kverkofilo.

Certe neniun ĝenos la homonimeco tiam, ke li emu misformi la internacie kodigitajn nomojn. Kvankam mankas konekso kun la supre traktita **-IL-**problemo, sendube ankaŭ **-FIL-**koincido meritas iom da atento.

Referencoj:

Technisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto (1967). R. Haferkorn. - Esperanto-Press, Cardiff.

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970). - Sennacieca Asocio Tutmonda. Paris.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto (1983). E. D. Krause. -VEB Verlag Enzyklopädie Leipzig.

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento (1987). - Sennacieca Asocio Tutmonda. Paris.

Inversa Vortaro de Esperanto (1989). B. Pabst. - Esperanto-Centro, Paderborna.

Kemia kaj Scienc-teknika Vortaro (1993). D. Portmann-D. Rogers, Naperville.

Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature, 1-10. J. Kavka. STARTO, 1994-1996, Praha.

Kontribue al PIV. Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature (1996). J. Kavka. - KAVA-PECH. Praha.



49-a IFEF-kongreso en Košice

Sabate la 10-an de majo 1997 venis preskaŭ 200 esperantistoj el 23 landoj al orientslovaka urbo Košice por viziti kaj trakti dum la 49-a kongreso de fervojistoj. Dum 12 horoj LKK-anoj de-joris en Košice-stacidomo. Laŭtparolilo bonvenigis ĉiujn Esperante kaj en la halo atendis nin informoj pri hoteloj kaj aliaj eblecoj por loĝi kaj vojaĝi en la urbo. Dum la tuta semajno sekvis unu faka prelego post la alia, sed ankaŭ tre agrablaj estis solena malfermo de la kongreso, kiun plivigligis junulinoj en kostumoj marŝantaj en la halo de la domo de arto. Tuttaga ekskurso al la

urbo Bardejov, duontaga al infana fervojlinio en Košice kaj vesperaj koncertoj, baloj kaj aliaj vidindaĵoj riĉigis sunan semajnon en Košice.

Estis balotita nova estraro kaj eldonitaj 5 fervojkajeroj kun la plej interesaj fakprelegoj. Hungaraj esperantistoj alportis unuajn fakvortarojn en Esperanto kaj aperis tri kongres-kurieroj. La jubilea 50-a IFEF-kongreso okazos en Danio kaj ĉiuj jam ĝojas tie denove renkontiĝi.

Libuše Filipová

EŬROP-UNIA KONGRESO EN STUTTGART

Inter 16-19 majo 1997 gastis la germana urbo Stuttgart preskaŭ 400 partoprenantojn de kongreso, kiu celis pritrakti la rolon de Esperanto en la unuiĝanta Eŭropo. Esperantistoj el ĝemelurboj de Stuttgart estis invitataj jam jaŭde antaŭ la kongreso por renkontiĝi kun la reprezentantoj de la magistrato: venis dudek personoj el la rusa Samara (= Kujbiŝev), naŭ el la pola Lodz kaj unu el la ĉeĥa Brno (M. Malovec). Interpretis junaj prezidantoj de la germana E-asocio Frank Stocker (32j) kaj de la Stuttgarta E-grupo Martin Schäffer (35j).

Post solena inaŭguro sabate antaŭtag-meze estis prezentitaj tri gravaj prelegoj: D-ro Rolf Linkohr, membro de Eŭropa

Parlamento, klarigis (germanlingve) problemojn de integriĝo de kelkaj ŝtatoj al Eŭropa Unio, precipe pro ekonomiaj diferencoj. Michael Cwik el Eŭropa Komisiono skizis, kiel tiuj diferencoj malhelpas formiĝon de unueca eŭropa valuto; kaj D-ro Werner Bormann pritraktis la lingvan situacion en la nuntempa EU, kaj kiel la situacio ankoraŭ komplikiĝos, kiam estos akceptitaj novaj membroj-ŝtatoj, kian solvon proponas la angla kaj kian Esperanto.

El ĉeĥaj esperantistoj partoprenis ankaŭ geedzoj Chrdle kaj Věra Barandovská-Frank kun sia edzo.

M. Malovec

ĈU VI VOLAS PLIPERFEKTIGI VIAN ESPERANTON? PARTOPRENU SOMERAN ESPERANTO-KURSON!



LANĈOV

29.6.-12.7.1997 unua etapo
13.7.-26.7.1997 dua etapo
27.7.-9.8.1997 tria etapo
10.8.-16.8.1997 libertempo sen
instruado

Loĝado en kabanjoj.
2550, - Kĉ plenkreskuloj
2350, - Kĉ geknaboj ĝis 15jaraj
1600, - Kĉ infanoj ĝis 10jaraj (sen
instruado)

Kontakt-adreso: Esperanto, 674 01
Třebíč

SEBRANICE

Katolika Esperanto-Tendaro

19.7. - 2. 8. 1997

Loĝado en tendoj
1400, - Kĉ plenkreskuloj
1250, - Kĉ junuloj, handikapuloj,
senlaboruloj

Kontakt-adreso: Miloslav Šváček,
Tršická ul. 6, 751 27 Penčice

PRAHA

Junularaj kursoj en mezlernejo

17.-23.7.1997

Kontaktadreso: Renata Beranova,
Svatoplukova 43, 784 01 Červenka

NEKVASOVY

17.8.-30.8.1997 en tranoktejo Sportklub

kursoj de Esperanto ne devigaj
restado unusemajna 1120, - Kĉ
dusemajna 1940, - Kĉ

Kontakt-adreso: Klub Esperanto Plzeň
Jiří Vomáčka
předseda
Koterovská ul. č. 30
301 41 Plzeň



KOMISIONO POR GAZETARO KAJ INFORMADO

Danĝeraj ĵurnalistoj

Esperantistoj el Ostrava sendas al gazetaj redakcioj sian dumonatan kluban cirkuleron por informi pri Esperanto kaj pri sia agado, sed ne ĉiam la bona intenco donas pozitivan rezulton. Al nia unua leciono de nova kurso venis 2 interesiĝantoj (juna flegistino kaj studento) kaj redaktoro de *Mladá fronta dnes*, kiu volis raporti pri nia „sukceso“. Feliĉe ŝi ne menciis la fiaskon, sed nia honto kaj amara sento pro vana peno restis. Nian unuan ekskurson en la naturon ni nuligis pro neintereso inter la klubanoj, sed ni ne rimarkis, ke dume la gazeto *Moravskoslezský den* publikigis la inviton kaj ke antaŭ la stacidomo nin vane atendas grupo da neesperantistoj. Kiam ni kunvokis kunvenon al la Kafejo Esperanto por omaĝi al s-ino Marie Bartovská, kiu jam 31 jarojn gvidas la kafejon, ni ne sciis, ke nin aŭskultas ankaŭ redaktoro de la ĵurnalo *Svoboda*. Ni plendis pri la neintereso de la publiko pri Esperanto, menciis la problemojn en Lančov. Post du tagoj aperis artikolo flata al s-ino Bartovská, sed malflata al nia movado.

Esperanto en amaskomunikiloj

Jen titolo de prelego, kiu okazis en la pola Cieszyn 22.3.1997 antaŭ trideko da polaj kaj ĉeĥaj aŭskultantoj (la prelego ripetigis 15.4.1997 en Glivice). Prelegis s-anoj Ing. Glaiĉar kaj Drahomír Kočvara pri gazetoj, radio, televido kaj ankaŭ pri komputila reto Internet, kiu

donas multajn esperojn. Diference de la klasikaj amaskomunikiloj en Interneton povas esperantistoj mem aktive eniri (necesas certa pago, sed ne tiom granda kiel ĉe televido), tial jam pluraj ekonomie fortaj asocioj jam regule disvastigas informojn pri la movado. La aŭskultantoj vidis ankaŭ kelkajn videofilmojn (ekz. pri Havířov 1989). Samtempe estis interkonsentita ĉijara jam tradicia (ekde 1925) renkontiĝo de ĉeĥaj kaj polaj esperantistoj sur la monto Čantoryja je 15.6.1997.

Kompakta disko „espeRom“

Du junaj germanaj studentoj preparis kompaktan diskon CD-ROM por komputiloj, sur kiu estas trovebla ekzemple la tuta teksto de Biblio kun bildoj, la informoj de GEA por Internet pri la movado, diversaj kursoj, kantoj, portretoj de Zamenhof kaj de aliaj esperantistoj, la Esperanto-biblioteko de Aalen ktp. Abonantoj de *Esperanto Aktuell* ricevis la diskon senpage.

Poetino proponis kunlaboron

Poetino Věra Ludíková sendis al Esperanta Literatura Fondaĵo en Brno siajn poemojn kun peto pri esperantigo (ŝi intencas eldoni la tradukon proprakoste kaj paralele kun ĉina traduko).

Eŭropa Esperanto-Unio

estas preparata ĉefe laŭ iniciato de germanaj esperantistoj kiel forumo por kunlaboro de eŭropaj Esperanto-asocioj.

KNABOJ AKTIVAS MEM

Nian klubon en Brno agrable surprizis 14-jara knabo el unu loka gimnazio, kiu venis al nia klubejo kun informo, ke li gvidas E-kurson kun ĉ. 50 knaboj de ilia lernejo. Li komence volis krei artefaritan lingvon, sed eksciinte el skolta publikajo pri ekzisto de Esperanto kaj trovinte en librovendejo ankoraŭ lernolibron de




Barandovská, li entuziasmiĝis kaj sukcesis entuziasmigi ankaŭ siajn samklasa-

nojn. La direktorino permesis instruadon vendrede posttagmeze kaj la knaboj discipline lernas sub gvido de sia samagulo (neimagebla situacio dum mia infanaĝo!). Venontfoje venis du liaj kursanoj por libroj kaj gazetoj, kiujn ni promesis por helpi la junajn esperantistojn. Ankaŭ de la asocio kaj de la junulara sekcio ili jam ricevis materialojn. Plej interese estas, ke la knabojn varbis neniu plenaĝa esperantisto, temas pri ilia propra iniciato, balzame esperiga por ni ĉiuj, kiuj jam timis, ke la nuntempa junularo furoras nur por la angla. Tiun ili lernas ankaŭ, do ni povos post certa tempo kompari, ĉu pli bonajn rezultojn donas Esperanto lernata propravole aŭ la angla instruata devige.

M. Malovec

20 m² pro svazové knihy

Svazové materiály, převážně knihy, jsou v současné době uskladněny v provizorních nevyhovujících podmínkách, kde jim hrozí škáza. Proto svaz hledá vhodné prostory, např. v domě některého člena, kde by našly útočiště. (Údaj v minulém čísle o 240 m² byl pochopitelně překlep). Pomůže i uskladnění aspoň části skladu. Nabídky zasílejte na svazovou adresu: Český esperantský svaz, p.s. 1069, 111 21 Praha.



Odesílatel:

Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1
☆ **STARTO** ☆

Periodikum Českého esperantského svazu (28. ročník)
Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno
Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (28-a jarkolekto)
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio
Abonprezo: 15 gld
Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno,
Ĉeĥio
Predis: OPATISK Opava

Podávání novinových zásilek povoleno
Českou poštou, s.p., Odštěpným závodem Severní Morava,
č.j. 1533/95-P/1 ze dne 3. 8. 1995

NOVINOVÁ ZÁSILKA

Poštovné hrazeno v hotovosti
u pošty 746 01 Opava 1

LORKOVÁ MARTA
CIHLÁŘSKÁ 16
602 00 BRNO